

## **Koncerto de ĴeLe ktp. - JES 2021**

- 1. Sonoril'**
- 2. La viruso**
- 3. Malnova aŭto (piano kvarmane)**
- 4. Hunda valso (piano kvarmane)**
- 5. Kankan - ŝerco (piano kvarmane)**
- 6. Ĉokolado**
- 7. Kukoj kun fromaĝ'**
- 8. E. Pütz - Valsette (piano kvarmane)**
- 9. Kredu al amo**
- 10. J.S. Bach – Andante pastorale el 'Sheep may safely graze' (piano kvarmane)**
- 11. Esperantolando**
- 12. G. Gershwin – Strike up the band (piano kvarmane)**

## **Sonoril' (laŭ melodio de „Jingle Bells“)**

**Sonoril', sonoril'**

**Din', din', din', din', din',**

**Glitas sledoj kun infanoj,**

**tintas sonoril' – din' !**

**Sonoril', sonoril'**

**Din', din', din', din', din',**

**Glitas sledoj kun infanoj,**

**tintas sonoril'.**

## **La viruso (laŭ melodio de „La muzo“)**

**En jaro du mil dudek aperis la viruso  
Ĝi kaptis tutan mondon, danĝera kaj tre ruza.  
Ni longe restis hejme, ne iris al vendejoj,  
kaj nek al laborejo, kaj nek al oficejo.**

**Nun pasis preskaŭ jaro, ŝanĝiĝis nia vivo,  
esploras la homaro kaj trovis la vakcinon.  
Viruso same fortas, ekonomi' kolapsas.  
Denove ni laboras, vizaĝon kovras masko.**

**La necesejpapero revenis al vendejoj,  
la prezoj por bicikloj nun kreskas nekredeble.  
Ne plu aviadilas mi ien eksterlanden,  
ferias sur balkono kun miaj novaj plantoj.**

**Delonge ne okazis aranĝoj junularaj,  
kongresoj nuligitaj kaj ankaŭ festivaloj.  
Distancaj lecionoj, distanca brakumado,  
kubuta salutado, aera kisumado.**

**Do, kion ni nun faru? Ĉu timi aŭ ne timi?  
Nenion povas plani kaj nur piede iri?  
Nun iĝas nia mondo komplete virtuala...  
Aĉetu vi biciklon kaj premu la pedalojn!**

**Tre bone por saneco en mondo digitala,  
veturas mi biciklon kaj premas la pedalojn! (3-foje)**

## **Ĉokolado (kanto el Francio)**

*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolado*  
*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolad' (4-foje)*

**Pensis mi, kion donaci**  
**al mia kara patrin'**  
**Pensis mi, kion donaci**  
**Por nova jar' al edzin'**

*Ĉoko-ĉoko-ĉokolado,*  
*dolĉa, dolĉa la bonbon'*  
*Bela, bela serenado*  
*Venu, venu al balkon'.*

*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolado*  
*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolad' (4-foje)*

**Urgis mi, sed malfruiĝis**  
**Al rendevu' kun knabin'**  
**Por ke ŝi ne ofendiĝu**  
**Gaje salutis mi ŝin per:**

*Ĉoko-ĉoko-ĉokolado,*  
*dolĉa, dolĉa la bonbon'*  
*Bela, bela serenado*  
*Venu, venu al balkon'.*

*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolado*  
*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolad' (4-foje)*

**Manĝu vi la ĉokoladon  
Manĝu kun granda persist'  
Sed ne forgesu konstati  
ke ja ekzistas dentist'**

*Ĉoko-ĉoko-ĉokolado,  
dolĉa, dolĉa la bonbon'  
Bela, bela serenado  
Venu, venu al balkon'.*

*Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolado  
Ĉoko-o-ĉoko-ĉokolad' (4-foje)*

## **Kukoj kun fromaĝ' (ŝerca ukraina popolokanto)**

**Parolis unu fraŭlo,  
Ke li por sia plaĉ'  
Bezonas junulinon  
Kaj kukojn kun fromaĝ'**

*Oj, ĉu vi, ĉu vi aŭdis,  
Ke li por sia plaĉ'  
Bezonas junulinon  
Kaj kukojn kun fromaĝ'*

**Invitis lin knabino  
en tre konvena aĝ'  
lin kisis kaj regalis  
per kukoj kun fromaĝ'.**

*Oj, ĉu vi, ĉu vi aŭdis,  
knabin' en juna aĝ'  
lin kisis kaj regalis  
per kukoj kun fromaĝ'.*

**Subite malamikoj  
en tiu-ĉi vilaĝ'  
forrabis la knabinon  
kaj kukojn kun fromaĝ'.**

*Oj, ĉu vi, ĉu vi aŭdis,  
pri tiu-ĉi domaĝ'?  
Forrabis la knabinon  
kaj kukojn kun fromaĝ'.*

**Kaj kriis nia fraŭlo  
en plena malkuraĝ'  
„Oj, savu, vilaĝanoj  
la kukojn kun fromaĝ'!“**

*Oj, ĉu vi, ĉu vi aŭdis,  
En plena malkuraĝ'  
li savis ne knabinon  
sed kukojn kun fromaĝ'.*

**Knabino lin forlasis  
kaj plendis sen domaĝ'  
li amis ne knabinon  
sed kukojn kun fromaĝ'.**

*Ĉy z syrom, ĉy bez syru,  
Vse z biloj muky  
Nikoly ne minjaite  
Divĉat' na pyrohy. VSE!*

**(originalo de ukraina strofo:**

*Чи з сиром, чи без сиру,  
все з білої муки,  
ніколи не міняйте  
дівчат на пироги. ВСЕ!)*

## **Kredu al amo**

**Se la vivo vin ne dorlotas  
Kaj dum varma tago vi frostas  
Se la homoj, kiuj apudas  
Iĝas fremdaj, sed tamen abundaj.**

**Se amaras la dolĉa vino  
Se la koro malplenas via  
Se neniu kaj nenio  
Povas ŝanĝi malplenan tian.**

***Kredu al amo, kredu al amo, kredu al amo.  
Kredu al amo, ĝia brakumo kaj ĝia flamo.***

**Se la muroj de la tristeco  
Pligrandiĝas de via soleco  
Belaj tagoj evitas vin  
Kaj vi grumblas pri la destin'**

**Eĉ en trista kastelo  
Dum vespero malhela  
Vin lumigas rideto  
Se vi nur iomete...**

***Kredas al amo, kredas al amo, kredas al amo.  
Kredas al amo, ĝia brakumo kaj ĝia flamo.***

## **Esperantolando**

**Venu vi, venu vi, venu vi, senprokraste.  
Venu vi, venu vi, venu vi, tempo hastu.  
Venu vi, venu vi, venu vi, mi petegas.  
Venu vi, venu vi, venu vi, esperegas.**

*Min logas Esperantolando, min logas (4-foje)*

**Ĉiujn vin, ĉiujn vin, ĉiujn vin mi bezonas  
Kiam ĉi, kiam ĉi, kiam ĉi kanto sonas.  
Estas ni, kune ni, kune ni familio  
Ĉu vi ne, ĉu vi ne, ĉu vi ne sentas tion?**

*Min logas Esperantolando, min logas (4-foje)*

**Tie ĉi, tie ĉi, tie ĉi sorĉa mondo,  
kredu ni, kredu ni, kredu ni al estonto.  
Tie ĉi, tie ĉi, tie ĉi bela mondo  
donas vi, donas vi, donas vi al mi forton.**

*Mi amas Esperantolandon, mi amas (4-foje)*